August Graf von Platen-Hallermünde,

La tomba nel Busento

tradukita de Giosuè Carducci

Cupi a notte canti suonano
Da Cosenza su 'l Busento,
Cupo il fiume gli rimormora
Dal suo gorgo sonnolento.

Su e giù pe 'l fiume passano
E ripassano ombre lente:
Alarico i Goti piangono,
Il gran morto di lor gente.

Ahi sì presto e da la patria
Così lungi avrà il riposo,
Mentre ancor bionda per gli ómeri
Va la chioma al poderoso!

Del Busento ecco si schierano
Su le sponde i Goti a pruova,
E dal corso usato il piegano
Dischiudendo una via nuova.

Dove l'onde pria muggivano
Cavan, cavano la terra;
E profondo il corpo calano,
A cavallo, armato in guerra.

. . .

August Graf von Platen-Hallermünde,

La tombo en la Busento

tradukita de H. Gerke

Nokto estas. Ĉe Kosenco,
kie la Busento ondas,
murmuretas surdaj kantoj,
de la akvo bru' respondas.

Sur la bordo tien-reen
movetiĝas kvazaŭ homoj:
mortis reĝo Alariko,
ploras gotaj la fantomoj.

Malproksime de la hejmo
la aspiroj neniiĝis,
malgraŭ ke sur liaj ŝultroj
bukloj de l' junec' ondiĝis.

Jen — fluejon novan fosis
la herooj tre profundan,
kun fervoro devojigis
la riveron, la abundan.

Sur malplena fundo ili
laboradis — jen kavaĵo!
entombigis la mortinton
sur ĉevalo kun armaĵo.

. . .

Lui di terra anche ricoprono
E gli arnesi d'òr lucenti:
De l'eroe crescan su l'umida
Fossa l'erbe de i torrenti!

Poi, ridotto a i noti tramiti,
Il Busento lasciò l'onde
Per l'antico letto valide
Spumeggiar tra le due sponde.

Cantò allora un coro d'uomini: -
Dormi, o re, ne la tua gloria!
Man romana mai non vìoli
La tua tomba e la memoria! -

Cantò, e lungo il canto udivasi
Per le schiere gote errare:
Recal tu, Busento rapido,
Recal tu da mare a mare.

. . .

La trezoron sian karan
ili kaŝis en la tero,
ke elkresku el la tombo
kreskaĵaro de l' rivero.

Rekondukis la riveron
per fervora laborado;
ree la antaŭan vojon
ŝaŭmis ĝi kun ondegado.

"Dormu en honor', heroo!"
kantis la funebra ĥoro,
"la avidon kontraŭstaru
via tombo, via gloro!"

Kaj la himno sonegadis
tra la gota heroaro,
rulu ĝin, Busento-ondo,
rulu ĝin de mar' al maro.

. . .

Traduko de la Germana poemo "Das Grab im Busento" de August Graf von Platen-Hallermünde *(∗1796 – †1835) en itala de* Giosuè Carducci *(∗1835 – †1907-02-16).*

Arg-840-1690 (2014-02-11 11:20:14)

Pri la tradukinto vidu la retejojn http://www.alarico.org/la_tomba_nel_busento_.html *kaj* http://de.wikipedia.org/wiki/GiosuГ¨_Carducci.

Traduko de la Germana poemo "Das Grab im Busento" de August Graf von Platen-Hallermünde *(∗1796 – †1835) en Esperanton de H. Gerke.*

Arg-840-1689 (2014-02-12 15:59:46)

Tiu ĉi traduko aperis en 1950 en „La Praktiko", Den Haag, Nederlando, n-ro. 9-12 (155-158), septembro-decembro 1950, (14-a jaro). Vidu ankaŭ: http://www.literaturo.dk/busento.htm*. Pri la rivero Busento vidu:* http://de.wikisource.org/wiki/Das_Grab_im_Busento*. Pri la tradukinto nenio estas trovebla en la interreto. Vidu ankaŭ:* http://www.mein-italien.info/it/letteratura/tomba-busento.htm*. Pri la gazeto "La Praktiko" vidu:* http://books.google.de/books/about/a_Praktiko.html?id=iG7lAAAAMAAJ&redir_esc=y*.*